# *Partoprenas Kubo en laborsesio de la Cepal pri la Covid-19*



Havano, okt 26 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel gvidas delegitaron de la insulo en la 38-a laborperiodo de la Ekonomika Komisiono de UN por Latinameriko kaj Karibio (CEPAL), kiu sesios por la unua fojo virtuale pro la epidemiologia situacio, ?is la 28-a de oktobro, la? informas la retejo de la ministerio pri eksteraj rilatoj.

La? la programo, Díaz-Canel transdonos formale la portempan prezidantecon de la Cepal al Kostariko, post dujara okupo ekde majo de 2018.

Analizinte la laboron de Kubo, Alicia Bárcena, ekzekutiva sekretario de Cepal, elstarigis ke la insulo “plenumis tre bonan agadon, kun givdkapablo, sindevigo kaj konvinko. Estis escepta, eminenta kaj akompanis nin kadre de tiu ?i pandemio, montrante rapidan reagkapablon”, deklaris kaj elstarigis la solidaran kontribuon de la insulo, samkiel ties emfazo por meti la multflankismon kiel kerna elemento por da?ripova evoluigo kun egaleco.

Bárcenas esprimis ke oni “sopiros pri la gvidanteco de Kubo, sed ne pri Kubo, ?ar spite al la nuna transdono de la prezidanteco, ?i da?re estos, mi certas, aktiva rolanto tre grava”, raportis Prensa Latina.

La tagordo de la laborperiodo konsistas en dialogo de ministroj pri eksteraj rilatoj, kiuj pritraktos la ekonomikan rekuperi?on PostCovid-19 kaj Politikan Deklaron, informis la vicministro kostarika Christian Guillermet, kaj inkluzivos  la kunsidon de la Kunlabora Komitato Sudo-Sudo kaj eventon pri la Defioj de la Karibo por konstrui pli bone, kaj aldone oni okazigos paralelajn eventojn pri afro-posteuloj,  pri a?uloj, homaj rajtoj kaj socia protekto.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/237836-partoprenas-kubo-en-laborsesio-de-la-cepal-pri-la-covid-19

Radio Habana Cuba